


DIA REGNO
ISSN 0167-9554

DIA REGNO

© dumonata kristana revuo en esperanto © Nro 1 (826) 2001

Protestantismo kaj fasto



Softkey

Nabal

Esav

La infero

Ekumenismo

Liturgio

Religio

Ĉinio

KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala,
kunlaboranta kun UEA

Celo: Krei efikan kontakton inter kristanoj el
diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la
Evangelion pri Jesuo Kristo.

Prezidanto: Jacques TUINDER

✉ Henegouwenlaan 35, NL 1966 RH Heemskeerk
☎ +31 251 231941; ✉ d.tuinder-dekker@wolmail.nl

Sekretario: Els VAN DIJK-KUPERUS

✉ Koningsmantel 4, NL 2403 HZ Alphen a/d Rijn,
Nederlando; ☎ +31 1724 20222;
✉ javadi@worldonline.nl

Kasisto: Siegfried KRÜGER,

✉ Dinkelsbühler Str. 12, DE 74074 Heilbronn,
Germanio ☎ +49 7131 162688; ✉ keli.@gmx.de

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto minimume
€ 15,- ☎ Membro-subtenanto € 22,- ☎ Nura abono:
pagante rekte al KELI € 12,- ☎ pagante al
Libroservo € 14,-. Sendoj de okcidentaj monbiletoj
per registrita letero al la kasisto de KELI ☎ Se estas
en via lando UEA—poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA)
bonvolu preferi pagi al UEA por konto **kelk-p** de
KELI ☎ Nederlanda poŝtĝirkonto de KELI: 5506132.

DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo — ISSN 0167-9554

Redaktoro: Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet, FR 86340,
Nouaillé-Maupertuis, Francio;

☎ +33(0)5 49 46 80 21; ✉ diaregno@altern.com.

Manuskriptojn oni sendu nur al la Redaktoro!

Abonprezo sen membreco en KELI: € 12,- aŭ
egalvaloro. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la
kaso de KELI (vidu supre).

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur
la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj,
kondiĉe, ke oni citas la fonton. Specimenon kun
reprezo aŭ traduko oni sendu al la Redaktoro.*

**Enpaĝigo, grafika prilaboro, presado kaj
ekspedado:**

Eldonejo **hejme** Kazimierz LEJA,
✉ pf. 59, PL 41-250 CZELADŹ, Pollando
☎ +48 32 763 37 13; ✉ kleja@post.pl

ENHAVTABELO

3 Protestantismo kaj fasto

Kelkaj notoj kaj rimarkoj de Michel
CLEMENT

6 Nabal, la stultulo

Medito pri kontraŭekzemplo de
David BUDDEN

7 Transdonita destino

Esav rerakontita de Gabriel
OSHÓ-DAVIES

9 La infero, miskomprenita loko

Edwin HARLER

10 Ekumenismo vidata el Italio

intervjuo de Gianni LONG

18 Per paca armilo al nova jarmilo

La novjara mesaĝo de la prezidanto
de UEA

24 Kristanoj en Chengdu

La vivo de la kristanoj en sudokcidenta
ĉina urbo.

REDAKTORAJ VORTOJ

Karaj gelegantoj,

Nova jaro, nova jarcento, nova jarmilo.
Ne tiel ofta okazaĵo. Sed, pri tio, ni ne foruzos
inkon, ĉefe ĉar neniu sendis al mi ion
pri tiu temo. Ĉu gravas?

En la nuna numero vi legos pri temoj,
kiuj interesos vin, mi esperas. Se ne estus,
mi ne aperigus, kvankam... Krom la bibliaj
meditoj, kutimaj al protestantoj, vi legos
ankaŭ konsiderojn pri asketismo kaj fasto,
pri kio ili ne kutimas. La afero de evoluo de
ekumenismo post *Dominus Iesus* plu-
daŭras. Parto pri liturgio, kun tradicia pro-
testanta teksto kaj moderna katolika estas
espereble komenco de serio. Via vico...

Iuj jam proponis, ke kelkaj tekstoj el la
revuo aperu en la interreto. Mi deziras ko-
ni vian sintenon (diaregno@altern.com).

Plej korajn bondezirojn

Philippe COUSSON

TEOLOGIO

Protestantismo kaj fasto

kaj notoj kaj rimarkoj

Senpere, ni povas diri ke fasto estas
nun la objekto de kromparolo, eĉ de
admirado ene de protestantismo. Kelk-
foje, iuj doktrinoj kiel higienismo kon-
fuzigas, kiam ili aranĝas laŭ spirita
modo siajn teoriojn. Aŭ kelkaj aŭtoroj
pli maltrankviliĝas pro sinkretismo kiu
kondukas nenien, eĉ kun abundo da
bibliaj kaj teologiaj temoj kiuj maskas
multfoje tezojn singarde manipulen-
dajn. Cetere, iuj teoriistoj asertas ke
sendube la perforto farita al la korpo
per fasto estas kreiva kaj povas kondu-
ki konsekvence al altruismaj valoroj.
Por fondi tiajn hipotezojn sur fortikaj
bazoj, oni miksas famulojn kiel JUNG,
GANDHI, ktp. Sen zorgi pri kontraŭ-
diroj kaj amalgamoj.

Veras ke en protestantismo, fasto ha-
vis nur malmultajn adeptojn, krom eb-
le dum la Vekiĝo (Réveil) kaj en kelkaj
religiaj grupoj. La plejparto de la
aŭtoroj, kiuj verkis pri tiu demando el
ĉiuj siaj protestantaj sentemoj, men-
cias, ke fasto devus esti praktikata
antaŭ ĉio for de la vojo de la Fido per la
Verkoj. Fakte, la tri tekstoj, kiuj estas
cititaj ĉi tie, t.e. Jesaja 58:6-12(i), Kol
2:20-23(ii) kaj 1 Kor 9:24-27, estas ri-
gardataj kiel la biblia kerno de tiu aske-
ta praktiko. Ili indikas al ni, ke tio kio
estis dirita antaŭe, rilatas al la dispo-
neblo por preĝo kaj meditado. Tial, la
heroa aspekto de fasto, kiel tekniko de
humiligo kaj de neado de la korpo,
estas rifuzita plejofte. La doloreca kaj

ofereca flanko estas rekte agnoskata
kiel ne evangelia. Ĉu necesas aldoni, ke
la plejparto de la protestantaj eklezioj
ofte ŝvebas inter rigoreca asketismo
kaj imitado de Kristo ekde la Reforma-
cio. Ni ne devas flankenlasi la katoli-
kajn influojn kaj spurojn, per
monaĥismo, ĉar ĝi enkondukas men-
son, teologion kaj ĝiajn proprajn meto-
dojn apogitajn sur multjarcenta histo-
rio, kiun kelkaj romkatolikaj monaĥoj
alproprigas kiel privatan bienon.

Tiel, la eseo de monaĥo Adalbert DE
VOGUÉ(iii) estas signifoplena koncer-
ne iu katolika sinteno rilate al fasto.
Cetere, kelkaj protestantaj aŭtoroj est-
as strange impresitaj, malgraŭ la mul-
tfoja insistado pri la merita aspekto de fa-
sto. Laŭ li, nia moderna vivo estas en-
profondiĝanta en senkorpiĝintan spiri-
tualismon, kaj tiel fasto povus esti pri-
vilegia rimedo por enkorpiĝi la fidon.

Post analizo de la Sanktaj Skriboj
iom sendetala kaj priskribo de la glora
ekzemplo de la malnovaj monaĥoj, DE
VOGUÉ trovas imitinda la faston ĝis
malsatego de Simeono la Kolonermi-
to. Tion li kvalifikas kiel grandioza
konkero de memo. Esence, la monaĥo
informas nin pri sia dekjara sperto pri
fasto: en preciza horaro (ellitiĝo je la
tria matene, celebrado de la nokta Di-
servo, intelekta kaj mana laboro, enlit-
iĝo antaŭ la naŭa ĉiusezone) la ermito
manĝas unufoje ĉirkaŭ la sesa (manĝo
konsistanta el ovo, fiŝaĵo, multaj lego-

moj, 300 ĝis 400 g. da pano kaj akvo; evidente nek viando, nek kafo aŭ teo). Krom en la libera tempo, pro tio ke la monaĥo ĉetabliĝas unufoje, li sentas per tiu fasto kaj vivoritmo profundan kvietigon: antaŭ ĉio, oni sentas la profitan efikon de fasto en la seksa kampon. Senpene mi povis konstati la ligon, pruvitan de la Antikvuloj, inter la unuaj precipaj malvirtoj, manĝemego kaj malĉasteco, kaj poste inter la du rilataj asketecoj, fasto kaj ĉasteco. Por religiulo kiu dediĉas sian vivon al tiu lasta virto, fasto estas la plej efika el la helpiloj. Al la feliĉaj horoj de fiziologia libereco pri kiu mi parolas, fantasmoj ne plu prezentiĝas. La ceteran tempon, ili facile sin lasas kontroli kaj forstrekis (iv). Li aldonas, elvokante kelkajn tekstojn de Paŭlo, ke la korpa dolorhumiliĝo estas postulo de la Spirito kaj kondiĉo de la spirita ekfloriĝo, estas tio, kion diversaj versikloj ŝajne asertas, kaj tio pruvas la unuanimecon de la praa asketa tradicio, daŭrigata per monaĥismo. Mia propra sperto pri fasto, iom limigita, pruvas plene tiun principon (v). Fine, ni povas diri, ke la aŭtoro, en la ĉapitro titolita rigardoj el la disiĝintaj fratoj, komprenis la teologion de LUTHER (LUTERO) rilate la verkojn(vi), sed li atribuas al Jean CALVIN (Johano KALVINO) kelkajn poentojn, ĉar ĉi tiu, laŭ DE VOGUË, situas inter la grekaj Patroj kaj LUTHER. Tiel, la protestantoj povus praktiki faston pro tri motivoj, laŭ CALVIN: por eduki la karnon, por sin pretigi al preĝoj kaj laŭdoj kaj por atesti pri nia humiligilo antaŭ Dio.(vii)

Rimarkinde konstateblas ke la verkistoj, kiuj pritraktas la temon de fasto kaj asketeco, evoluigas sian propran ekzegezon kaj apogas siajn tezojn sur

la tradicio de la grekaj Patroj, adaptante ilin al niaj socioj, bedaŭrinde sen detaloj. La diverseco de interpretoj, laŭ la diversaj teologiaj kaj ekleziaj kampoj, estas evidentaj ĉi kaze: ni prenos ĉi tie mallongan tekston de Paŭlo, kiu estas komentita ofte, t.e. 1 Kor 9:24-27. (viii). Veras ke la paŭla asketeco malgraŭ kelkaj interpretoj limigantaj ĝian rigorecon instigas al tiu peno, sed ĉu estas necese kompreni tiel la atletan signifon ŝajne precipan en tiu teksto: necesas laŭ Paŭlo konservi sin vigla por noktogardado. Estas ankaŭ vere ke Paŭlo kontraŭmetas en la versiklo 25 la dirmanierojn: pereontan kronon kaj nepereontan kronon kaj tuj ni povas vidi en ili kelkajn filozofiajn kaj asketismajn aludojn al la antikva demando pri pureco kaj al la metodaj esploroj pri vero en tiu malpura mondo. Ĉu oni trouzas tiun tekston kiam oni vidas en ĝi la gnostikan kaj platonan pensmanierojn? Kiel interpretas ĝin la ekzegezisto Christophe SENFT: „...tion, kion atletoj faras senhezite por gajni kronon senvaloran, ni devas fari des pli por krono nepereonta (ix). Ŝajne, Paŭlo direktas sian pensadon al la laboro de konvertiĝo por si mem kaj por la mondo en kiu ni vivas. Tiu serĉado povas havi la trajtojn de ia disciplino kiun oni povas kompari senekcese al tiu de atleto; tio kion ne ekskludas faston kiel unu el la elementoj de trejnadado, sed ne faras el ĝi celon en si mem por meriti kronon de pli pura gloro.

Tiel, ĉu asketeco, sekve fasto, vidata kiel rimedo, alidirektiĝas kiam ĝi estas praktikata dum multaj jaroj, konservante la iluzion pri si mem kaj antaŭ aliulo, ke ĝi estas la reĝa vojo al Kristo? Rapide, la sojlo estas trairita kiam, la Biblio en la mano kaj la Patroj

kiel atestantoj, oni kredigas al si per pezaj penoj kaj konstantaj mankoj, ke povas esti nur unu vojo por la fortuloj, kaj alia por la malfortuloj. La parabolo de la semisto (Luko 8:5-15) helpas al ni pensadi pri tiuj gravaj demandoj.

Michel CLÉMENT

<mclément@francemultimedia.fr>

Notoj:

i. **Jesaja 58:6-12:** 6 Ja nur tio estas fasto, kiu plaĉas al Mi, se vi disŝiros la ligilojn de malpieco, disbatos la kateĵojn de sklaveco, liberigos la prematojn, disbatos ĉian jugon; 7 se vi derompos vian panon por malsatulo kaj senhejmajn malriĉulojn enkondukos en vian domon; se, vidante nudulon, vi lin vestos, kaj antaŭ viaj samkarnuloj vi vin ne kaŝos. 8 Tiam via lumo ekbrilos kiel matenruĝo, kaj via saniĝo rapide progresos; via virto iros antaŭ vi; la gloro de la Eternulo gardos vin malantaŭe. 9 Tiam vi vokos, kaj la Eternulo respondos; vi krios, kaj Li diros: Jen Mi estas! Se vi forigos el inter vi premadon, montradon per fingro, kaj paroladon malbonan, 10 kaj malfermos antaŭ malsatulo vian koron, kaj satigos suferantan animon, tiam via lumo brilos en mallumo kaj via krepusko estos kiel tagmezo; 11 kaj la Eternulo kondukos vin ĉiam kaj satigos vian animon en tempo de senpluveco, kaj Li fortikiĝos viajn ostojn; kaj vi estas kiel ĝardeno akvumata, kaj kiel akva fonto, kies akvo ne mankas. 12 Kaj oni rekonstruos ĉe vi la antikvajn ruinojn; la fundamentojn de antaŭ multaj generacioj vi restarigos; kaj oni nomos vin riparanto de breĉoj, reboniganto de vojoj por loĝado.

ii. **Koloseanoj 2:20-23:** 20 Se vi mortis kun Kristo for de la elementoj de la mondo, kial, kiel vivantaj en la mondo, vi submetiĝas al dekretoj: 21 Ne tuŝu, ne gustumu, ne palpu, 22 pri ĉio, kio pereas per la uzado, laŭ la ordonoj kaj doktrinoj de homoj? 23 Ĉio tio havas ŝajnon de saĝeco en volokulto kaj humileco kaj severeco rilate al la korpo, sed ne en ia valoro por plensatigo de la karno.

iii. En la franca versio de la libro de Adalbert DE VOGUË, Aimer le jeûne, Paris: Cerf, 1988.

iv. Citita verko, p.18.

v. Citita verko, p.73-74.

vi. Precipe, en la franca versio de la Verkaro de LUTHER: Des bonnes œuvres, en Œuvres, tome I, Genève: Labor et Fides, 1957, p. 214, 217, 220, 230, 259-261, 285-287.

vii. En la franca versio de la verkaro de CALVIN: Institution de la religion chrétienne, Livre IV, Paris: Ed. J.-D. Benoît, 1961, p. 250-257 (ĉap. XII, 14-21); Libro III, p. 83-84 (ĉap. III, 17) kaj 109 (ĉap. IV, 11); Libro IV, p.66 (ĉap III, 12).

viii. **1 Korintanoj 9:24-27:** 24 Ĉu vi ne scias, ke ĉiuj kurantoj en la areno kuras, sed nur unu ricevas la premion? Tiel same kuru, por ke vi atingu. 25 Kaj ĉiu konkuranto sin regas en ĉio. Ili faras tion, por ricevi pereontan kronon; sed ni, nepereontan. 26 Mi do tiel kuras, kiel ne sendecide; tiel mi boksas, kiel ne batante la aeron; 27 sed mi kontuzas mian korpon, kaj ĝin subpremas; por ke mi, predikinte al aliaj, nepre ne estu mem forrifuzata.

ix. SENFT, Christophe, La Première épître de saint Paul aux Corinthiens, Genève: Labor et Fides, 1990, p.126.

Nabal, la stultulo

En 2 Samuel, ĉapitro 25, oni legas pri Nabal. Verŝajne la nomo „Nabal” estis moknomo ĉar ĝi signifas, „stultulo” — kaj neniu donus tian nomon al sia infano. Nabal estis riĉega — li havis grandajn ŝafarojn kaj kaprarojn; li estis „tre potenca”. La edzino de Nabal estis „prudenta kaj belaspekta”; ŝi nomiĝis Abigail.

Oni scivolas, kiel tia virino fariĝis edzino de „stultulo” kaj kiel li fariĝis tiel riĉa. Eble alkoholo estis ĉe la radiko de lia falo kaj antaŭe li estis prudenta kaj laborema. Certe alkoholo kontribuis al la frua morto de Nabal.

David, pasinte, ofte helpis al Nabal; li ŝirmis la ŝafarojn kontraŭ sovaĝaj bestoj kaj ŝtelistoj. Okazis, ke David bezonis nutraĵon por siaj sekvantoj, do certa ke Nabal volonte reciprokos la helpon jam donitan, David sendis al li por peti helpon. La senditoj ricevis malĝentilan respondon, „Kiu estas David?... Ĉu mi prenu *mian* panon kaj *mian* akvon, kaj *mian* viandon, kiun mi buĉis kaj donu...” (vs. 11).

Tia respondo kolerigis Davidon kaj li tuj planis venĝon — la morton de tia fiĥomo.

Sed Abigail intervenis. Ŝi iris renkonte al David kaj ŝi petegis ke li aŭskultu ŝin. Per ĝentilaj vortoj ŝi moligis la kordon de David kaj konsilis lin: „Ne malpurigu viajn manojn per la sango de tia fiĥomo, kaj lasu venĝon en la manoj de Dio”. David atentis ŝiajn saĝajn vortojn kaj benis ŝin.

Ni rimarku, David estis vere humila; li ne estis fierulo. Antaŭ la okuloj de 400 sekvantoj, li agnoskis, ke la vortoj de Abigail estas ĝustaj, ke ŝi estas saĝa kaj,

ke liaj unuaj intencoj estis malsaĝaj. Ni devas admiri Davidon pro tio.

Finfine, Nabal festis manĝemule; li ebriiĝis kaj mortis.

* * * * *

Mi scivolas, ĉu Jesuo havis la rakonton pri Nabal (malsaĝulo) en menso kiam li donis la parabolon pri la riĉa senprudentulo (Luko 12:16-21). Rimarku la vortojn:

„La bieno de unu riĉulo donis abunde; kaj li konsideris, dirante, Kion mi faru... mi disbatos miajn grenejojn kaj konstruos pli grandajn ... mi amasigos *mian* grenon kaj *miajn* posedaĵojn. Kaj mi diros al *mia* animo... ripozu, manĝu, trinku, estu gaja. Sed Dio diris al li: Ho senprudentulo! ĉi tiun nokton oni postulos de vi vian animon. ... Tia estas tiu, kiu kolektas por si trezoron, kaj ne estas riĉa rilate Dion”.

* * * * *

Jen mirinda ekzemplo, kiel Jesuo konis kaj uzis sian Biblion. Fakte multaj el la paraboloj de Jesuo havas radikojn en la Malnova Testamento — ofte el la Sentencoj de Salomono.

Sed tiu simpla rakonto de Jesuo enhavas gravegan lecionon. Kiom da homoj pasigas la vivojn per la amasado de mono — kaj poste ili mortas ankoraŭ junaj — kaj aliaj malŝparas la riĉecon, aŭ eĉ pli malbone, kverelas pri la mono.

Alia leciono de Nabal. Alkoholo detruis lin; anstataŭ „potenca” li fariĝis senprudenta kaj oni mokis lin per la nomo „stultulo”.

David BUDDEN

Transdonita destino

Biblia rakonto reverkita

La juna viro eniras la grandan familian kabanon. Li estas tre laca kaj malsata ĉar la tutan tagon li jam laboris sur sian bienon kaj aliloke

Ĉe la enirejo li retrorigardas por vidi la subirantan sunon. Certe li ne ŝatas ion pri la tagon: tion ke li ne povis kapti eĉ unu besteton. Dum lia tuta vivo kiel bienulo kaj bestĉasisto, li neniam havis tian malbonan sperton kiel la hodiaŭa. „Foriru, sunaĉo, kune kun via sortaĉo”, li ŝajnas diri, kiel li turnas sin al la direkto de la kabana ripozejo. Li vidas nenium: nek panjo, nek paĉjo, nek frato troviĝas. Li faligas siajn ilojn kaj sidiĝas.

Subite lia nazo ekrakontas ion interesan al li. Sen vorto li ekstaras, kaj eksekvas la nazon kiel ĝi ekmontras la vojon. Post nelonge, li troviĝas en la kuirejo kie lia frato Jakobo kuiras tre bonodoran supon.

La ekvido de la supo kaj la odoro nun akriĝas sian bezonon por manĝo. Nu, li afable salutas sian fraton, kvankam ili ne afable rilatas unu kun la alia. Dum ilia tuta vivo oni povas vidi eĉ post kelkaj minutoj de kontakto kun la familio, ke ili ĉiam kverelas. Unu envias la alian. Tiun malbonan rilaton helpas la gepatroj, kiuj senkaŝe montras sian preferon, fare de patro por Esav, kaj de patrino por Jakobo.

„Kiel vi fartis hodiaŭ, Esav?”, estas la malvarma reciproko de Jakobo. Li eĉ ne atendas respondon ĉar li tuj turniĝas al sia kuirado.

Esav ankoraŭ restas ĉe la enirejo. Li scias ke Jakobo scias, ke li ankoraŭ restas, sed nur ne volas plu agnoski lian ĉeeston. Hoo, Ĉielo, li mortas pro lace-

co kaj malsato. Kion li faros?

Li ekpensas: ĉu mi nur atendos ĝis morto forkaptos min, aŭ mi faru proponon al frataĉo kiu eĉ ne afable reciprokis saluton mian. Se mi proponas li eble diros: ne. Sed se li ne rifuzas mi povos pluvivi. Mi proponos, ĉar tio kostos nenion.

„Jakobo kara — li finfine rompas la silenton — bonvolu doni al mi el tiu ĉi via manĝo, ĉar mi mortas”.

Esav silente malbenas sian fraton kiu ne emociiĝas pro mencio de morto.

La petego daŭras tri minutojn antaŭ ol Jakobo turniĝas al sia frato kiu preskaŭ ploras pro malsateco.

„Nu — fiere diras Jakobo al Esav, — mi donos, nur... se... vi... transdonos... al... mi... vian... unuanaskitecon”.

Eble alia ulo koleriĝus pro tia propono! Unuanaskiteco rajtigas lin heredi ĉion kion havas la patro. (Unuanaskiteco de Jesuo Kristo — lin kaj ĉiujn kristanojn — rajtigas heredi la regnon de Dio — Rom. 8:16,17). Sed malsateco blindigas lin, tiom ke li volas fari ion ajn por havigi al si la manĝon.

„Nun ke mi preskaŭ mortas, frato, unuanaskiteco ne valoras al mi. Donu al mi supon je kio ajn kosto”. Jakobo aŭskultas. La Ĉielo ankaŭ aŭskultas! La anĝeloj atentat!

La suno jam subiras, kaj nun noktigas. Forestas panjo, forestas paĉjo. Antaŭ Jakobo restas Esav, faranta petaĉon kiu eterne ŝanĝos lian sorton. Nur la Ĉielo kaj anĝeloj atestas la okazon. Baldaŭ pro efemera aĵo, oni transdonos sian eternan rajton, sian gloron, sian porencon. Pro supo! Dum la Ĉielo atentat, Esav, per ĵuro asertas la

Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

22a JARKOLEKTO 2001

Informiĝu pri la okazontaĵoj en la nova 3a jarmilo pere de la internacia revuo MONATO. Ĝi raportas el ĉiuj anguloj de la mondo, tra la okuloj de lokaj loĝantoj kaj informos vin pri aspektoj kaj eroj kiujn aliaj naciaj kaj internaciaj revuoj en la mondo preteratentas. En la tuta Esperantujo ĝi estas unikaĵo, la nura revuo kiu plenumas la celon de Esperanto ĝisfunde: informi ne pri, sed per Esperanto.

Mendu la revuon de la eldonanto
Flandra Esperanto-Ligo
Frankrijklei 140
B-2000 Antwerpen
BELGIO
Retadreso: monato@fel.esperanto.be

EUR 39,00 estas baza prezo. Rabatojn petu de la eldonejo.

EUR 39,00

Redonu do al Cezaro la proprajon de Cezaro, kaj al Dio la proprajon de Dio.

(Mateo 22:21)

Kion signifas tio tradukita nuntempen? Donu al la demokratio vian kritikan solidarecon, engaĝiĝu por ĝia plibonigo kaj por pli da humaneco. Donu al demokratio vian kunlaboron kaj sciopovon. Sed donu al la ŝtato, kiu sin absolutigas, al politikistoj, kiuj sin idoligas, klaran malakcepton. Kontraŭstaru, kie la digno kaj la rajtoj de homo ne estas respektaj.

Sed donu al Dio la honoron, esti Sinjoro super la homoj. Donu al Dio viajn pensojn kaj interesojn, vian ambicion kaj vian aktivecon! Vi nur donos al Dio, kio apartenas al Li, se vi ankaŭ donos al la homoj, kio apartenas al Li: Libereco, ĝojo kaj justeco kaj digno, kiuj estas netuŝeblaj.

adaptis el la germana
Siegfried KRÜGER

↳ transdonon de sia unuanaskiteco al Jakobo.

Forpasis jaroj. Isaako la patro mortas kaj jam maturas tempo transdoni la dian benon. Li volas beni Esavon ĉar la rajto al lia posedaĵo nature apartenas al li, estante la unuanaskita filo. Poste li povos doni kion ajn restas el la beno al Jakobo. Sed Isaako ne scias pri la transdono kiu jam okazis, kion atestis Dio mem. Per ruzeco fare de Jakobo kaj lia panjo kiu tre amas lin la benon ricevas Jakobo. Tion akceptas Dio! Ho Diaj vojoj estas senlimaj! Kaj kiu povas pridemandi Lin? Esav malestimis Dion kiam li malestimis la Dian ordo-

non, ke unuanaskiteco de homo rajtigas lin al eterna posedo de heredaĵo de patro lia. Tion Jesuo rifuzis malestimi kiam Satano tentis Lin (Luko 4:2-8).

Kiam alvenas Esav por ricevi la benon, preskaŭ nenio restas por li. Oni do scias, ke li ja scias ke unuanaskiteco rajtigas homon al heredo de posedaĵo de lia patro. Li do intence, tamen pro malsato, malestimis ĝin. Kun ploro li petegas: benu ankaŭ min (Gen. 27:34), sed respondas Isaako, ke Jakobo jam ruze ricevis lian benon. Sed la Ĉielo kajn anĝeloj diras: ne ruze sed rajte!

Pastoro
Olúbùnmi Gabriel OSHÓ-DAVIES

La Infero, miskomprenita loko

La Infero estas tre miskomprenita loko. En ĉi tiu artikolo ni traktas kelkajn el tiaj miskomprenoj laŭ la ĝenerala pensado.

La Inferon ni konas laŭ multaj nomoj kaj priskriboj. Jen estas kelkaj: fajro neestingebla (Mat 3:12), pordego al la pereco (Mat 7:13), esktera mallumo (Mat 8:12), loko de kondamnado (Mat 12:37), la forno de fajro (Mat 13:42), la eterna fajro (Mat 18:8), Gehena (Mat 18:9), eterna puno (Mat 25:46), apartigo de Dio kaj de la Sinjoro Jesuo (2 Tes 1:8-9), estas loko sen ripozo (Apok 14:11), lago fajra, brulanta per sulfuro (Apok 19:20).

La hebrea vorto Šeol kaj la greka vorto Hades egalas laŭ unu Biblia vortaro kaj ne signifas Inferon, sed la lokon kien ĉiuj el la mortintoj iras ĝis la juĝado. (Eblas ke tio helpas krei la kredon pri Purgatorio. Bedaŭrinde, neniu povas kredi por ni; tion ni devas fari por ni mem dum la vivo. „... ĉar per la koro la homo kredas ĝis justeco, kaj per la buŝo konfesas ĝis savo” [Rom 10:10]). La egaleco de la du vortoj estas kontraŭstarita per aliaj vortaroj kaj, ŝajne, estas interŝanĝeblaj laŭ la plaĉo de la tradukantoj de la Biblio.

La plej multaj el niaj kredoj pri la Infero venas el la Mezepoko. Ekzemple: la diablo kaj liaj anĝeloj ne kuras tien kaj reen pikante la enloĝantojn de la Infero per forkegoj kaj ridante pro la doloro, kion ili trudas. Tio estas tute falsa. Dio kreis la Inferon por Satano kaj liaj anĝeloj (Mat 25:41, Apok 20:10). Tiuj, kiuj ne akceptas la senpa-

gan donacon de savo estos kunigitaj kun Satano pro la malakcepto, sed la Infero originis pro Satano. Li estos la turmentita, ne la turmentanto.

Alia miskompreno estas, ke la Infero estas konkreta loko, kiun oni povas lokigi.

Efektive la Infero estas stato de ekzisto, kiu ne havas lokon. Se estas alie, la Biblio ne sciigas tion al ni. Ordinare angloparolantoj pensas, ke la Ĉielo estas supre kaj la Infero malsupre, ĉar tion ili legas en la versio de la Reĝo Jakobo de la Biblio (vidu Mat 11:23 — anglalingve Hades oni tradukas Hell, kio estas Infero: „... ĉu vi estos altigita ĝis la ĉielo? Vi malsupreniĝos ĝis Hades...”).

Nu, ni scias la nomon, sed la Biblio ne donas lokon.

Multaj kredas ke Dio de amo ne povas kondamni iun al eterno en la Infero. Tiu ne havas meriton, ĉar Dio estas Dio de justeco kaj sankteco krom Dio de amo. Dio ne povas ignori pekon; necesas puno. Tiuj, kiuj malakceptas la senpagan donacon de savado, rifuzas la amon kaj pardonon de Dio. Ili restas pekantojn kaj tio malpermesas ilian eniron en la Ĉielo. La sankteco de Dio ne permesas ke Li kuniĝu kun pekantoj.

Unu demando estas pri la „ekstera mallumo” kaj la lumo el la fajro de la Infero. Kiel eblas ambaŭ samtempe? En Naĥum 1:6 ni legas: „Kiu povas kontraŭstari al Lia indigno? Kaj kiu povas elteni la flamon de Lia kolero? Lia indigno disverŝiĝas kiel fajro; la ro-

Ekumenismo vidata el Italio

Gianni LONG taksas staton de ekumena dialogo. Estro de Itala eklezia federacio diras, ke 2001 estas decida jaro. Milano, Italio, Jan. 19, 2001 (Zenit.org — Avvenire) <<http://www.zenit.org>>

Kadre de la Semajno de Preĝado por la Unuiĝo de Kristanoj, la prezidanto de la Itala Federacio de Eklezioj, Gianni LONG, diris ke la jaro 2001 estos decida por la renoviĝo de la ekumena vojo. LONG estas valdano kaj laika membro de sia eklezio.

Italaj evangelianoj esprimis ĉi tiun esperon en lastatempe eldonita dokumento titolita „Ni remalfermu la pordon de ekumenismo”. La dokumento, laŭ LONG „estas signo por la renoviĝo de la dialogo, post la problemoj ekaperintaj pri la interpreto de iuj lastatempaj vaticanaj dokumentoj. Ta-

men LONG atentigas, ke la pasinta jaro ne estis tute negativa: „progreson oni faris sur la ekumena vojo”.

— **D: Kie, precipe, estis farita progreso?**

— Long: Mi pripensas la interkonsenton pri interkonfesiaj miksgedziĝoj; sed ankaŭ pri tiom da laboro farita pri la Biblio — la kun-disdonado farita, la literatura interkonfesia traduko de la Evangelio de Johano; la demando pri la ŝuldoj de malriĉaj landoj, celo kiun antaŭenigis kaj katolikoj kaj protestantoj, kvankam malsammanie-



koj disfalas antaŭ Li”. En la Skribaĵoj fajro estas la simbolo por la kolero de Dio. Kondamnitaj sentas la koleron, aŭ flamon de Dio, kiu ne enhavas lumon. Pro la nelumeco de la Dia kolero, la damnitaj loĝos en mallumo.

Tio ankaŭ klarigas la demandon pri la ĉieco de Dio. Se Dio estas ĉie, ĉu Li ne ankaŭ estas en la Infero? Certe jes. Psalmoj 139:7-8 atestas pri tio. „Kien mi iros for de Via spirito? Kaj kien mi kuros for de Via vizaĝo? Se mi leviĝos al la ĉielo, Vi estas tie; Se mi kuŝiĝos en Ŝeol, jen Vi tie estas”. Sed estas nur la kolero de Dio kiu ĉeestas en la Infero; mankas Lia amo. Kaj, pro la manko de

Lia amo, ankaŭ mankas lumo.

Bonvolu rimarki, ke la virtuloj kaj la malvirtuloj estas apartigitaj en Ŝeol (aŭ la Infero). Legu la rakonton pri la riĉulo kaj Lazaro, la almozulo, en Luko 16:19-31. En 16:26 ni legas: „Kaj krom ĉio tio staras granda abismo inter ni [en la Ĉielo] kaj vi [en la Infero], tiel ke tiuj, kiuj volus iri de ĉi tie al vi, ne povas, kaj oni ne povas transiri de tie al ni”.

Johano la Baptisto diris al lia samtempanaro: „... kiu vin avertis forkuri de la venonta kolero?” (Luko 3:7). Kaj ni aldonas: „Se iu havas orelojn por aŭdi, tiu aŭdu” (Marko 4:23).

Edwin HARLER

re. Ne hazarde ni indikis ĉi tiujn punktojn en la dokumento kiel temojn kiujn oni povus pritrakti en la denova dialogo.

Pli ĝenerale, oni povas diri ke kiam ni alfrontas ion specifan, ion farendan, ekumenismo progresas. Problemoj leviĝas kiam ni debatas pri principoj.

— **D: Ĉu la sperto de komuna preĝado povus esti ankaŭ la okazo lerni diskuti principojn?**

— LONG: Ni ne komencas de nulo. Ni memoru la tutan vojon laŭiritan pri la Patro Nia kaj biblia ekzegezo. Nuntempe, la interŝanĝo inter kulturaj tradicioj estas firmigita fakto. Estas sufiĉe normale, ke komentario kiun verkis protestanto estu uzata en katolika fakultato de teologio, kaj inverse. Ofte oni ekkonscias tion nur post kiam oni legas la noton pri la aŭtoro sur la interna kovrilo.

— **D: Kio estas atendebla de komuna preĝado?**

— LONG: Tiu estas preĝado prope; kaj ĝi povas ankaŭ helpi al ni kune identigi la punktojn de malfacilo. Ĝi estas komuna preĝado por la unuiĝo de kristanoj, en kiu ĉiuj facile interkonsentas. Tamen, ankaŭ povas esti alvokado pri iuj specialaj aspektoj de la ekumena vojo.

Ekzemple, mi pripensas miksgeparojn: ĝis antaŭ kelkaj jaroj, ili estis la roko de skandalo. Hodiaŭ, tamen, dum ekumenaj renkontiĝoj ili estas kialo de komuna preĝado. La helpo de Dio estas alvokata sur ĉi tiujn personojn, kiuj propre vivas laŭ la suferado de la eklezia disiĝo.

— **D: La jaro 2001 estas proklamata kiel grava. Oni debatas La „Eŭropan Ekumenan Ĉarton”**

kaj, en aprilo, asembleo okazos en Strasbourg. Kiel vi rigardas ĉi tiujn du defiojn por ekumenismo?

— LONG: Mi opinias, ke ni ne havas tro da malfaciloj rilate al la „Ekumena Ĉarto” preparante tekston akcepteblan al ĉiuj.

Rilate al la asembleo de Eŭropaj Kristanaj konfesioj, la fakto ke ĝi ne okazos en Saloniko [Grekio], laŭ la unua plano, estas simptomo de la problemoj ekzistantaj en la ortodoksa mondo. Estas bedaŭrinde, ke post realaĵo protestanta kiel Bazelo, kaj katolika kiel Graz [1997], oni ne povas vivi laŭ ĉi tiu sperto en lando kun ortodoksa plimulto.

Ĉiuokaze, Strasbourg proponas interesajn aspektojn: ĝi estas la loko de la politika estonteco eŭropa, ĝi estas la urbo kiu simboligas homajn rajtojn. Ĉiuokaze, estas grave ke 2001 estu ĉiusence jaro de malfermeco. Tiurilate, mi trovis la papan mesaĝon de la 1-a de januaro tre interesa. Ĉi tiu estas ankaŭ [la celo] de la dokumento kiun ni ĵus verkis.

— **D: Preter oficialaj interrilatoj, kia estas la situacio de ekumenismo en Italio nuntempe? Ĉu estas „popola” sperto de dialogo inter kristanoj de malsamaj konfesioj, kiu impresis multajn en la lasta ekumena asembleo en Graz?**

— LONG: La Jubileo estis problemo pro diversaj kialoj; sed la spirito restas. Mi vidis ĝin, ankaŭ, en ĉio kio estis organizita dum ĉi tiu Semajno de Preĝado. Ekumenismo estas temo amata. Tamen, ni ne nin trompu: pri la temo de la unueco de kristanoj ni alfrontas la problemon, kiel etendi pre-

La regiona episkopo, prelato Paul DIETRICH el la virtemberga protestanta eklezio, estis kelkajn semajnojn post la publikado de „Dominus Jesus” dum kvin tagoj kun delegacio en Romo. En Vatikano okazis malkaŝaj kaj disputaj paroladoj speciale en la „Papa konsilantaro por subteni la unuecon de kristanoj” kun ties sekretario, episkopo Walter KASPER. KASPER provis komprenigi la formulon de „ne estas eklezio en la propra senco” kaj parolis pri „difekto en en la savoperado” ĉe la protestantaj eklezioj en la okuloj de Romo. Post la fratosencaj paroladoj DIETRICH por si mem konstatas:

Ĉiu eklezio havas konsiderindajn difektojn en la savoperado. La plej sekvo plena difekto estas, se iu eklezio tiujn difektojn ne perceptus. Kristo vivas en difektaj eklezioj. Kaj li efikas ne nur malgraŭ niaj homecaj, sed ankaŭ malgraŭ niaj ekleziaj difektoj. Kio estiĝas el la eklezioj, se tio estas alia?

El novjara letero de prelato DIETRICH (DE, Heilbronn) resumita de Siegfried KRÜGER



ter la plej „devontigintoj”. Eble, por kreskigi ĉi tiun konscion oni pripensu ion kiel amasa ekumena renkontiĝo kia la „Kirchentag” en Germanio, ekzemple.

ZE01011901

en traduko de Mike LEON aperinta sur la listo IKUE.

Dankon al M. LEON (*Dia Regno*, n-ro 5, 2000, p. 3) liveranta okazon al distingo inter doktrino kaj praktiko rilate la Sinjormanĝon.

M. LEON celas al „kio estas”, G. BERVELING celas al „kio servas”. Ĉu eblas preterlasi unu flankon el la du? Se iu longe pripensas la praktikon, ties enhavojn kaj ties ekzistrajton ktp, alvenas fine al doktrino kaj al doktriniĝo.

Se Jesuo celis krei kontraŭdiskriminacian fratan komunumon (kaj homaron) kaj tion esprimi per figuroj (kaj praktiko) de kunmanĝo, tio emociigas kaj metas lin en la longan liston de eminentuloj kaj reformuloj kaj filozofoj ktp, vivintaj antaŭ kaj post Kristo. Je Jesuaj tempoj, tri jarcentoj de helenisimo, se restrikti nian rigardon al tiu parto de la mondo, ion similan kaj ankaŭ per similaj esprimoj, jam eksentigis. Certe Jesuo enpemis akcelon al tiuj ideoj (kaj ankaŭ praktiko, ĉu ne?) de egala digneco inter ĉiuj homoj ktp, kaj precipe li liveris la motivojn devigantajn al tiu praktiko (kaj doktrino).

Tamen se Jesuo restriktis sian penson al tiu fratiĝo ne pri multi (aŭ ne tute) iniciatiĝas. Almenaŭ mi, se temas nur pri tio, mi sentas minimuman bezonon je Jesuo, ĉar la samajn idealojn mi trovas eĉ pliklare kaj pliefike proklamitaj fare de filozofoj kaj reformuloj, ofte ne kristanaj kaj foje kontraŭkristanaj.

Sekvantoj de Jesuo pretendis vidi, en tiu lia invito (kaj praktiko) kunmanĝi, ankaŭ ion alian, ion tute lian, ion originalan, ion kondiĉantan kaj signantan lian komunumon. ĉu kristanoj nur pretendis — eble por savi aŭ inventi specialecon kaj ekstraordinare-

Sekvante la inviton de Adolf BURKHARDT kaj konsentante kun la ĉi-subaj sugestoj de la luterana episkopo d-ro RENZ,

„Akceptante la doktoran diplomon, d-ro RENZ finis sian prelegon en Auditorium Maximum de la universitato per jenaj tri tezoj:

1) *Ekumeno ne estas kroma kampo aŭ eventuala hobbio, sed dimensio kiu nepre apartenas al la kerno de eklezia laboro, simile kiel pastoralo, predikado aŭ diakonia helpo.*

2) *Ekumeno bezonas la personan renkontiĝon kun homoj el aliaj eklezioj kaj kulturoj. Ĝi bezonas la sperton de fremda spiritualeco, fremdaj Diservoj kaj fremdaj formoj de socia engaĝiĝo. Nur per tio kreskas ekumeno — ne per papero.*

3) *Tiujn renkontiĝojn necesas reflekte pripensi. Ne ĉio fremda estas bona. Ne ĉio nekonata estas pli bona ol*



de ilia Jesuo — aŭ ĉu ili sciis, kaj transdonis kaj praktikis, ke lia invito al la Sinjormanĝo entenas ankaŭ alian anoncon?

Se nun oni priparolus pri tiu supozita anonco, certe pri tiu ĉi estas avertitaj la invititoj al la kunmanĝo. Do tiu kunmanĝo ne estas pura kunmanĝo. Kio do estas? Haltu! Tiupunkte travidiĝas la risko de doktrinigo!

Konvenas elvicigi Jesuon el la listo nure tuta homa de granduloj kaj geniuloj por lin envicigi flanke de la Sinjormanĝanto kiuj evangelie diras kun li: tio estas mia korpo...

Armando ZECCHIN

mi volus transdoni miam forfuĝantan pripensadon. Mi tenas tramane kaj trafoliumas la dokumenton *Dominus Jesus*. Al mi ŝajnas, ke mi estas leganta unu el la dekoj — eble centoj — da similaj dokumentoj de la diversaj kristanaj eklezioj. Kion faras la katolika eklezio per tiu dokumento? Laŭ mi, ĝia celo estas difini sin mem kaj proklami siajn karakterizojn fronte al ĉiuj aliaj kristanaj konfesioj.

Nu, ĉu tion ne faris, de tempo al tempo, ne malmultaj kristanaj konfesioj ne-katolikaj?

Ĉiu kristana konfesio opinias ke ĝi mem posedas la veran kaj pli kompletan kristanismon kaj diras tion distingigante disde aliaj konfesioj. Ĉu eblas pensi ke iu konfesio (aŭ eklezio) atribuu al alia konfesio pli kompletan, kaj pli bone kredprofesatan, kristanismon? Tio egalvalorus ĉesi ekzisti kaj transpaŝi, korpe kaj anime, en alian konfesion!

Katolikoj havas pri si opiniojn samkiel aliaj konfesioj havas la siajn. Kiu konfesio ne atribuas al si la plejbonan kaj tion ne vidas realigita, kaj pro tio grumblas, en la aliaj konfesioj?

...Pro tio supra mi havas impreson, legante la dokumenton *Dominus Jesus*, pri similaĵoj jam aŭditaj de multaj fontoj.

Ekumenismo antaŭeniru sendepende de la difinoj kiujn kristanaj konfesioj tiras el siaj tradicioj...

Ekumenismo celas ankaŭ trovi tion kio komunas kaj, eventuale, pli larĝigi komunajojn, ĉu ne?

Kio direndas pri tia impresoj?...

Armando ZECCHIN

el la listo IKUE

Religio — tute ne konata afero

Folieto disdonita de pastoro Dieter SCHAT post prelego antaŭ studentoj en serio „*Reciproka efiko inter Religio kaj Ekonomio*”.

Ĉiu parolas pri tio, malmultaj nur scias, kio ĝi estas: RELIGIO.

Ĉu ĝi estas malnovaĵo, eraro, trompo, konspiro, opio...?

Aŭ ĉu ĝi estas vivgajno, interna apogo, vojo al si mem, ĉar vojo al Dio?

Kiom da vereco estas en ĝi? Aŭ ĉu estas religioj arbitraj, laŭvolaj, pro tio relativaj?

Ĉu vivo sen RELIGIO ne estas pli bona, pli komforta, pli memdestinita, pli sukcesa?

Ĉu ne en ĉiuj epokoj kaj en ĉiuj kulturoj en la nomo de religio okazis teruraĵoj, estis homoj manipulitaj, subpremitaj, murditaj, herezultitaj, fanatikitaj, adaptitaj, konsolitaj je la ĉielo, buŝmurditaj?

Tamen validas ankaŭ tio: RELIGIO estigis kulturojn, aranĝis individuan kaj societan vivon kaj gvidis ĝin al plej alta florado. Ĝi gvidis unuopulojn, sed ankaŭ multajn kulturpopolojn al plej

altaj kulturaj sukcesoj en arto, ekonomio kaj tekniko. Ĝi aranĝis la konsciencan al la bono, fondis respondecon, donis sencon kaj profilon al homa laboro kaj ekonomio. Religio konsolis kaj fortikigis en sufero kaj morto, helpis elteni solecon kaj malamikecon, liberigis internajn fortojn.

Ĝi donacis al la vivo ĉiutaga „transcendecon”, ĝi enmetis la vivon kaj la disponeblan mondon en la ĉion inkluzivan universalecon de la fine maldisponiblajn.

Ĝi fine kreis konscion por viv- kaj ekzistad-spertoj kiel AMO, LIBERECO, DIGNO, JUSTECO, KOMPLETECO.

RELIGIO malfermis la dimension de homa ekzistado al nova vivaĵdestino de la homo: Esti kiel Dio kaj esti amata de Dio, kapabligita per tio, bridi siajn agresojn, korekti sian erarecon, akcepti siajn limojn, kreskigi flugilojn je sia sopiro kaj espero, doni plenumiĝon kaj konstantecon al sia amo, ekzerci en pardonemon, gardi pacon kaj vivi la ĝojon je la belo kaj bono.

trad. Siegfried KRÜGER



Pri religieco aliflanke

Kadre de raporto pri lastaj esploroj de okcidentaj sciencistoj Pola Presagen-tejo PAP informas, ke religio povas kontribui al konsiderinda plilongiĝo de la vivo. Laŭ prof. Mary Gilhooly el la skota Universitato Paisley, „bonfara” influo de religio al la homa vivo rivelacias en tio, ke li/ŝi haltigas damaĝi la propran sanon. La kredantoj havas pli malaltan sangotension, ili pli malofte malsanas je kormalsanoj kaj karcinomoj, en pli malgranda grado tuŝas ilin deprimoj. Malfacile kredeblas je tio, kion diras la sciencistoj, kaj nome, ke des pli ofta estas partopreno en Diservoj, des pli bonigas tio nian sanon!

Kiel diras sciencistoj, tipo de konfeso ne havas en tiu kazo signifon, tamen la vera kondiĉo de la „bonfara” influo de religio por la homa korpo estas ĝia traktado kiel la celo en si mem, kaj ne kiel porsana kuracado. Tuta serio da gvidataj esploroj apogiĝis sur 42 projektoj arigantaj interparolojn kun 126 usonanoj.

Jen la nuntempa psikologio kune kun medicino ŝajnas aserti la teorion famigitan de multaj jarcentoj, ke en la homo ekzistas determinita ligo inter liaj korpo kaj animo, kaj ankaŭ tio, ke la natura riĉo de la homo estas en tiu kulturo, kiu akceptas en sia horizonto la religion. Sed tiuj du tezoj estas vera klinisaluto de la nuntempa scienco en la flankon, kiel oni ŝajnas, tiel pratempan kaj tiel ekmalamatan por multaj eraoj — kiel mezepoko.

Certe inter kontraŭuloj de tiuj esploroj ekaperos tezoj, ke „bonfara” influo de la religio estas la rezulto de nefinita

evoluo de la homa genro aŭ ke tio estas la rezulto de fortoj enstantaj en subkonscio — de arketipoj. Sed tia klarigo ankaŭ certe ne ĉiujn kontentigas.

Oni povas restadi malkontenta, ke la sciencistoj ne provis diferencigi diversajn religiojn. Oni ne scias, ĉu estis decidite egaligi ĉiujn konfesiojn, por ke oni ne diru pri iu simpatio, aŭ ĉu vere el la esploroj rezultas, ke ĉiu religio, ĉiu kredo de homo je transcendo havas tiel grandan signifon por homa korpo. Tamen valoras atentigi, ke la esploroj ne rilatas rekte al tio, kio estas la unua kaj la vera rezulto de la kredo de homo, kaj kio videblas en la spirita vivo. Se tamen tian utiligon la religio alportas al la homa korpo, des pli multe profitas je tio animo kaj la tuta spaco de la interna vivo de homo.

En la spaco de la homa vivo oni povas malaranĝi konfesiojn, tamen oni devas „pagi” pro tio difinitan prezon. Tia malekzisto mezuriĝas bedaŭrinde ankaŭ per sanecaj komplikajoj.

Estas ankoraŭ unu aspekto de tiu tempo. Ĉu flanke de malfermitaj socioj kaj demokratiaj ŝtatoj ne valoras apogi religiojn per iuj programoj de sanprotektado, se temas ekzemple pri la batalo kun (aŭ pli bone — kontraŭ?) kormalsanoj aŭ ekzemple dermofitozo? Aŭ eble oni devas vokigi ekzemple Oficialan Protektanton de la Religia Sano? Tamen, tiam oni devas (-us?) verŝajne iam diri pri la reala minaco de la ekzisto de iuforma „konfesia ŝtato”, ĉu ne?

Stanisław ŚMIGIELSKI

La pekokonfesa preĝo de Jean CALVIN (Johano KALVINO)

En Rumanio estas du reformataj episkopujoj, nome la Transilvania kaj la Parciuma. La lasta situas okcidente, de Transilvanio, kaj formiĝis post la dispartigo de Tisa episkopujo hungara, post la Unua Mondmilito.

La ekleziaj komunumoj de Oradea, apartenas al Parciuma episkopujo, kaj la plej nova komunumo estas la preĝejon konstruanta: Rogerius—a Reformata Paroĥo, kun sia formiĝanta komunumo.

En Transilvanio jam de antaŭlonge la preĝo de CALVIN estas integra parto de la Diservo, sed en la preĝejoj de Parciumo nur lastatempe oni enkondukis ĝin, kaj laŭte kune preĝas hungare. Ĉu vi rekonas tiun vere gravan preĝon en mia traduko, el hungara versio?

PEKOKONFESA PREĜO DE JOHANO KALVINO

Disinjoro, eterna kaj ĉiopova nia Patro! Jen, ni kunvenis ĉi tie kaj en la interligo de sanktuloj, kune kun anĝeloj kaj beataj animoj, ni alportas nian oferon al Via trono.

Ni konfesas kaj ekkonas antaŭ Via sankta moŝto, ke ni estas kompatindaj pekuloj; en kulpo koncipiĝinta, emaj al ĉiuj malbonoj, kaj neniam ĉesas ni trapaŝi Viajn sanktajn ordonojn. Kiam ni ĉi tion faras, el Via justa juĝo ni altiras al ni pereon kaj damnon. Pro ĉio Sinjoro, ni pentas, ke ni indignigis Vin, kaj ni riproĉas nin kaj niajn pekojn, kun vera pentito petante, ke Via graco venu kiel helpo por ni.

Kun humilo ni petas Vin, amanta

kompatema Patro nia, ke Vi indulgu nin. Forigu niajn kulpojn, pligrandigu kaj multigu je ni de tago al tago la donacojn de Via Sankta Spirito, ke el nia vera pentito kresku la fruktoj de la konvertiĝo, kiuj estas karaj antaŭ Vi.

Por tio kredokonfesas ni antaŭ viaj okuloj, ke ni nur en via ununaskita Filo, en nia Sinjoro Jesuo Kristo ni semas niajn kredon kaj esperon, certaj pri tio, ke pere de kredo ni povos esti partoprenantoj en Li, deklarita via graco, kiun donu al ni ĉi tie kaj en eterneco pro Lia nomo. Amen.

(Pekoliberigo responde de la pastro:) Post konfeso de viaj kulpoj kaj pruvoatesto pri via kredo; aŭdu la gracan respondon de Dio pere de Lia vorto, kiam alparolas tiel al vi: Dio tiel amis la mondon, ke Li donis sian solenaskitan Filon, por ke tiu kiu kredas en Li ne pereu, sed havu eternan vivon.

Jen mia provo prezenti al vi la preĝon de Calvin, scivolante kiel ĝi montriĝas en aliaj tradukoj. Se vi konsideras la temon pridiskutinda, bonvolu reagi. Dankon.

Attila MAKAY
amakay@oradea.iiruc.ro

Noto de la redaktoro: Mia unua intenco estis korekti la tradukon en komparo kun la tradicia formo en la franca, origina lingvo de tiu teksto, kvankam uzata en modernigita formo. Mi ne tion faris. Sed povus esti bona ideo kolekti diversajn Diservajn (liturgiajn tekstojn uzatajn en diversaj lokoj, ĉu tradiciaj, ĉu modernaj. Mi do atendas viajn kontribuojn.

P. C.

*Sinjoro, Dio nia,
Vi al la beata Alojzije STEPINAC
donis gracon forte kredi Jesuon
Kriston kaj pretecon suferi por
Li ĝis lia martira morto.*

Helpu al ni sekvi lian ekzemplon kaj lian instruon por ke ni amu Kriston same kiel li amis Lin kaj ke ni servu al la Eklezio kiel li servis al Ĝi eĉ oferante sian propran vivon por Ĝi.

Lia viva kredo je Jesuo Kristo kaj sencesa amo al la Eklezio plifortigu nin dum la vivbataloj sur la vojo al eterna savo.

Laŭ lia porparolo, donu al ni gracon

Kun Kristo Sinjoro nia. Amen.

El la listo IKUE
tradukita de Marija BELOSEVIC

Noto: * Interreta diskuto rilate al la unue aperinta titolo de la preĝo: *Preĝo al la beata...*

Dankon, Marija, pro tiu atentigo. Min unue momenton fortimigis, ke jen invito preĝi al la beata kardinalo. En la reformacia tradicio, ni ne povas preĝi al homo kiel ajn pia au modela — do mi pensis: nenio por mi! Sed kia surprizo: la preĝanto direktas sin al Dio kun danko pro tiu homo martiro kaj ricevas inspiron kaj esperon el lia modelo — jen nenia bariero inter niaj preĝoj. Do, kial nomi ĝin „preĝo al...” Ĉu nur pro kutimo?

Salutas kore

Adolf BURKHARDT

Dankon Adolf pro la reago.

Titolo „preĝo al” estas kutima esprimo, do ŝajnas kutima en la kroata lingvo kaj tiel mi tradukis ĝin.

Mi pardonpetas pro tio.

Marija

Kara frato Adolf,

Kvankam Via demando estas adrestita al Marija, permesu min doni iun klarigon (mi petas al Marija konfirmi).

Mi pensas, ke ne temas pri preĝo al beata Alojzije Stepinac, sed pri la t. n. tagpreĝo, t.e. la preĝo kiu korespondas al la festo— aŭ memortago kiun la Eklezio celebras. Tiu preĝo estas parto de la Meso kaj ankaŭ estas uzata kiel finpreĝo en la brevierio ktp. Tiuj ĉi tagpreĝoj ĉiam adresiĝas al Dio, t. e. al la Sankta Triunuo aŭ al iu el ties Personoj, sed mencias, kompreneble la sanktulon aŭ la specifan eventon el la sav—historio kiun oni memorigas.

Cetere, mi — postkiam mi havis la feliĉon partopreni en la ekumena celebros de la martiroj de la lasta jarcento (al Koloseo en Romo dum la jubilea jaro) — eĉ pli forte sentis kiom tiuj atestantoj de la povo de la Kruco kaj Resurekto de Jesuo Kristo pliproksimigis nin kristanoj de ĉiu konfeso. Mi neniam forgesis tiun eventon.

Frate,

Cristian MOCANU

PER PACA ARMILO EN NOVA JARMILO

Tiom UEA vastiĝis tra la mondo ke la tradicia nov-jara mesaĝo devus esti sendita plurajn fojojn tra la jaro. Multaj el niaj membroj festas la novan jaron nun, sed ekzistas ankaŭ multaj kiuj festas ĝin post kelkaj tagoj; aliaj, kiuj festas ĝin en marto aŭ septembro; aliaj, kiuj nun festas ne la novan jaron sed Ramadanon; kaj certe eĉ aliaj. Ĉiukaze, pro respekto al la tradicio, ni restu ĉe la komenco de la kristana kalendaro.

Novjara mesaĝo estas okazo por priaksi kun kritika distanco la evoluon dum la pasinta jaro kaj por esprimi dezirojn pri la evoluo en la posta jaro.

La Esperanto-movado dum la jaro 2000 daŭrigis sian kutiman kreskon. Ne lasu ke misgvidu vin la membro-nombro de ĉi tiu aŭ de aliaj organizaĵoj. En efektiveco, ĉi-momente Esperanto kreskas, foje eĉ tumulte, en regionoj kiuj ne eniras la bon-konduktan cirkon de la ok plej industriaj landoj en la mondo.

Ekster tiuj ok landoj esperantistoj apenaŭ povas revii pagi kotizojn aŭ aĉeti librojn eldonatajn en tradicie fortaj bazoj de la movado. Defio staras antaŭ UEA kaj la ceteraj organizaĵoj: ĉu ni sukcesos trovi manierojn enplekti tiujn homojn en la vivon de Esperantujo? Nia himno nenie asertas ke la flugiloj de facila vento devas porti la novan senton nur de riĉa loko al riĉa loko.

Se vi do vivas en lando kie ne estas problemoj pagi la kotizon de individua

membro, bonvolu fari tion. Per tio vi helpas ĉiujn agadojn de UEA (ekde disvastigo de Esperanto inter la junularo aŭ en la Interreta mondo ĝis helpo al la movado en Afriko aŭ Nepalo). Jen kiel, fakte, oni elspezos la monon de via kotizo. Krome, vi aliĝos al la rondo de la esperantistoj plej bone informataj per la plej legata Esperanto-revuo, kaj vi estos inter la plej favorataj partoprenantoj de Universalaj Kongresoj, aĉetantoj de libroj kun rabatoj ktp.

Estas nun finiĝanta Kampanjo 2000, kiun sindediĉe sekvis la esperantistaro en multaj landoj. Ĝi portis kelkajn sukcesojn, dum ĉe iuj agad-flankoj progreso forestas. UEA, kiel reprezentanto de la monda esperantistaro, regajnis ĉiujn ŝanceliĝintajn poziciojn ĉe internaciaj organizaĵoj, kiel UN kaj Unesko kaj aliaj ankoraŭ, kaj ĝuste en la dua duono de la jaro 2000 atingis pliajn rezultojn. Esperantistoj estis petataj prelegi en Unesko mem al la tuta mondo de neregistaraj organizaĵoj (NRO). Neniu ridetis kaj neniu primokis, multaj eĉ petis rilati kun ni. Same okazas en UN, kie, dank' al la refortigita Novjorka Oficejo, oni komencas ricevi de pluraj flankoj subtenojn por la rezolucio de la Seula konferenco de NRO-j (1999), kiu postulas ke UN finfine alfrontu la problemon de lingvaj homaj rajtoj kaj la eblan solvon pere de neutrala lingvo.

En ĉiuj kontinentoj esperantistoj ko-

mencas funkciigi ĉiam pli sukcese siajn kontinentajn aŭ landarajn Esperanto-asociojn, -uniojn kaj -komisionojn. Mi ne povas ne mencii la amerikajn kaj aziajn kongresojn, kiel brilajn ekzemplojn de tio kion oni faras. Mi ne povas ne mencii la revigliĝon de Eŭropa Esperanto-Unio, kiu eble siavice revigliĝos kelkajn Esperanto-agade margenajn eŭropajn landojn. Mi certas ke eŭropaj esperantistoj kapablos ĝis maksimumo ekspluati la eblojn kiujn prezentas la Eŭropa Jaro de Lingvoj 2001, por montri al la mondo, kiu vere volas subteni plurlingvecon kaj sekurigi la plu-ekziston de naciaj lingvoj.

Apud la tradiciaj rimedoj por Esperanto-agado pli kaj pli ekspansias io nova: Interreto. Estas vere mirinde konstati kiel rapide esperantistoj sukcesis adaptiĝi al ĉi tiu moderna komunik-rimedo kaj utiligi ĝin por Esperanto.

Tiu kampo certe prezentas al ni multajn eblojn (mi ne kaŝu de vi ke multaj novaj esperantistoj en multaj malnovaj landoj varbiĝas pere de interretaj kursoj). UEA kaj la ceteraj organizaĵoj devus, laŭ mi, iom pli kuraĝe plonĝi en ĉi tiun maregon, kie oni trovas amason da junaj kaj interesaj homoj. Ĝuste tiajn homojn ni bezonas.

Ĉar ni parolas pri junaj homoj, estas oportune mencii la labor-streĉojn de nia junulara sekcio TEJO, kiu rekomencas produkti novajn ideojn kaj novajn sukcesajn agadojn. Mi apelacias al ĉiuj legantoj de ĉi tiu mesaĝo, junaj kaj maljunaj, ke ili klopodu superi organizaĵajn kaj aĝajn limojn kaj antaŭenigi kunlaboron. Ĉiu plia novjara mesaĝo fakte portas nin pli proksimen al la momento kiam la TEJO-homoj devos transpreni la torĉon (kaj mem verki siajn novjarajn mesaĝojn). Same mi

petas ĉies kunlaboron por ILEI, nia instruista brako. Apenaŭ necesas diri ke kie oni ne instruas Esperanton, oni ne kreas esperantistojn. Instruado havas fortan lokon en la nun diskutata nova laborplano de UEA.

Mi ne povas fini ĉi tiun mesaĝon sen du lastaj konsideroj.

Niaj fakaj asocioj devas fortiĝi, por apliki Esperanton en la praktiko. Nur kiam Esperanto estos lingvo per kiu oni povas aĉeti kamionon en Eŭropo kaj sendi ĝin al Afriko, tiam Esperanto komencos esti vere normale internacia lingvo.

Mi parolis pri kamionoj kaj komercado, sed ne estas malsame pri spiritaĵoj kaj kulturaj varoj. Kiel ĉiam okazis en la pasinteco, ekzistas fortoj en la mondo kiuj postulas rezigni je demokratio favore al ekonomia efikeco. Ne estas strange ke tiujn ideojn subtenas ĉefe tiuj kiuj estas (aŭ esperas esti) ekonomie fortaj. Ni apartenas, laŭ mi, al la alia flanko, al tiuj kiuj postulas ke la homo estu en la centro de la atento, kiuj pensas ke ekonomia evoluo havas sencin nur se ĝi plifeliĉigas, ne se ĝi mortigas la homon per malsanoj aŭ destruantu alian mondon. Ni postulas ke ankaŭ en la lingva kaj kultura kampo estu demokratio, ke neniu humiliĝu kaj submetiĝu. Tion ni diru laŭte kaj klare en ĉiuj forumoj en kiuj ni havos la eblon paroli dum la venonta jaro. Interne de la movado, ĉiuj bonvolu partopreni la diskutojn pri la labor-plano, kies slogana resumo estas ĝuste: Al lingva demokratio!

Bondezirojn al vi kaj al Esperanto en la jaro 2001-a.

Kep ENDERBY, CO de UEA
Interredaktore

S-ino Elisabeth BARBAY organizas infanan renkontiĝon en Gresillon kaj petas min dissendi jenan informon:

**14a-21a de aprilo 2001:
INTERNACIA INFANRENKONTO EN LA KULTURDOMO
KASTELO GREZIJONO.**

Nia kastelo, post preskaŭ trijara fermado pro renovigado kaj alnormigado, iĝis denove uzebla por gastigado de vizitantoj kaj staĝanoj. Do, senprokraste, ni decidis organizi, same kiel okazis tie dum multnombraj jaroj, infanrenkonton. Se vi neniam havis la ŝancon viziti Grezijonon, lasu min kelkvorte priskribi ĝin: la kasteleto staras apud lageto, meze de 17-hektara parko, en la ĉirkaŭa kamparo de la urbeto Baugé. La departemento (Maine-et-Loire) kaj la tuta regiono enhavas multajn vizitindaĵojn kaj ĝenerale ĝuas agrablan klimaton. Surmape, vi trovos Baugé-n proksimume inter Angers kaj Le Mans. Interne, la domo estas ne-luksa sed komforta kaj povas akcepti nuntempe nur 35 personojn, atendante ke oni rajtos uzi la duan etaĝon. Krom dormoĉambroj (unu-, du-, tri-, aŭ kvarlitaj) kaj duŝoj, ĝi enhavas kuirrejon, du manĝoĉambrojn, bibliotekon, salonon. En alia tuteapuda konstruaĵo troviĝas alia granda salono, butikoj, kaj pluraj malpli vastaj ĉambroj kie povas okazi kursoj, kunvenoj...

La jena renkonto celas infanojn 6/7 ĝis 14/15 jarajn, eĉ komencantojn. La akompanantoj povas esti instruisto, klubo-ĝvidanto... aŭ parenco. Konsidere la nombron de disponeblaj litoj, estus preferinde ke ĉiu grandulo akompanu minimume 2 kaj maksimume 8 infanojn.

Antaŭpensita programo:

Matene: en grupetoj de 5/6 infanoj

(samaĝaj aŭ/kaj samnivelaj), lingvo-perfektigo per diversaj aktivaĵoj en esperanto (kurseto, lernado de kantoj, ludoj, konversacio, arto-farado, eble kuk-kuirado...) laŭ elekto de ĉiu plenkreskulo grup-ĝvidanto.

Posttagmeze: promenadoj, turismaj vizitoj, skipaj ludoj...

Vespere: prezento de kantoj, teatraĵetoj, poezioj, dancoj, diapozitivaj filmoj... kiujn ĉiu grupo estos preparinta antaŭ la renkonto.

Se vi intencas partopreni, viaj ideoj kaj proponoj estos bonvenaj.

Kompreneble, tiu plena semajno de komuna vivo inter infanoj kaj plenkreskuloj diverskulturaj ankaŭ estos riĉiga sperto por ĉiuj. Kreiĝos amikecaj ligiloj, ebligoj de leter- aŭ ret-korespondado...

La tuta semajno, entene ĉiujn manĝojn, tranoktadon, kaj surlokaj aktivaĵojn, (sed sen transporto) por franca partoprenonto (infano aŭ plenkreskulo), kostas 800 francajn frankojn (122 EU-rojn). Antaŭvidi malgrandan suplementon por eventualaj pagendaĵoj (ekzemple: vizito de kastelo, kaprobredoj...).

Por inskribiĝi aŭ informiĝi pri specifaj kondiĉoj por eksterlandanoj, bonvolu kontakti min plej frue:

Elisabeth BARBAY
25, allée GABRIEL FAURE
93140 BONDY / FRANCIO

Tel: 01 48 47 23 87

retadreso: Eliz.Barbay@wanadoo.fr

LA TRIA INTERNACIA FOTOKONKURSO

La Ondo de Esperanto kaj Urala Esperantista Societo (UES), post la sukceso en 1998 kaj 1999, organizis en 2000 la trian Internacian Fotokonkurson. La konkurso ne estis dediĉita al iu temo. Partoprenis 62 fotoverkoj de 18 aŭtoroj el 10 landoj: Britio, Bulgario, Finnlando, Hispanio, Hungario, Irano, Litovio, Pollando, Ruslando, Urugvajo. (En 1998 estis 42, kaj en 1999 — 43 konkursaĵoj).

La 17an de januaro 2001 la juĝkomisiono anoncis la rezultojn:

1-a premio: Andrea OTTOK (Hungario) pro „Infana ĝojo”.

2-a premio: Luz VÁSQUEZ SONTA (Hispanio) pro „Patrineco”.

3-a premio: Robert KAMIŃSKI (Pollando) pro „Malnova Jerusalemo”.

Laŭda mencio: Raita PYHÄLÄ (Finnlando) pro „La suno en la lago”.

Specialaj premioj (pro fotoj teme ligitaj kun Esperanto):

Robert KAMIŃSKI (Pollando) pro „Pardonu! En Ĉinio nun estas nokto-mezo”;

Sandra BURGUES ROCA (Urugvajo) pro „Ankaŭ mi volas lerni Esperanton”.

Laŭ la Regularo de la Konkurso, la kunorganizantoj havas ekskluzivan rajton ĝis la 31a de decembro 2002 uzi ĉiujn ricevatajn fotojn en papera kaj elektronika formo kaj en ekspozicioj.

Dankon al la partoprenintoj!

Gratulon al la laŭreatoj!

De: „Sezonoj” <sezonoj@mail.ru>

Novaj el Hilellista rondo

Komence de ĉi-jaro Hilellista rondo, por pli vaste sin malfermi, redifinis sin kiel „universaletika” kaj ne plu „religietika” Esperanto-rondo. Iom renovigitaj estas ankaŭ teksto de la Deklaracio de hilellisto kaj projekto de la Statuto de Tutmonda Hilellista Asocio. La retpaĝejo de Hilellista rondo (hejmpaĝo: „http://www.geocities.com/hilellistarondo” estas pliriĉigita per kelkaj novaj vizitindaj kunligitaj paĝoj, enhavantaj interalie kompletajn originajn hilellismajn kaj homaranismajn tekstojn de L. L. ZAMENHOF (momente ĉiam ankoraŭ sen la unua broŝuro el la jaro 1901).

* * * * *

Hilellista rondo en sia retpaĝejo ĵus lanĉis retpaĝon:

http://www.geocities.com/hilellistarondo/zginform.htm

kun multaj praktikaj utilaj esperantlingvaj informoj por vizitantoj de Zagrebo (Kroatio), kie ĉi-jare okazos 1-a Hilellista Renkontiĝo, sed ankaŭ 86-a Universala Kongreso de Esperanto, 15-a Ekumena E-Kongreso, 51-a kongreso de Kristana Esperantista Ligo Internacia, 54-a kongreso de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista kaj kelkaj aliaj E-aranĝoj.

La pormomenta kunordiganto

Mato SPEKULJAK

Antaŭ 40 jaroj mi eklernis Esperanton per gazetkurso. Dum iom pli ol 12 jaroj mi instruis Esperanton al gejunuloj, 10- ĝis 18-jaruloj en esperantoklubo. Mi volis pruvi al mi mem kaj aliaj ke eblas interesi gejunulojn pri Esperanto ne nur por momento sed longdaŭre.

Tute libervole 12 membroj de mia grupo partoprenis sukcesplene en unu aŭ pli da landaj esperanto-ekzamenoj. Kelkaj el ili ankoraŭ ne estis 15-jaraj, pro kio ili ricevis premion el iu fondaĵo. La sukcesintoj helpis min instrui la aliajn grupanojn.

Nun mi instruas plejofte plenkreskulojn, hejme, skribe kaj per interreto. Je <http://www.xs4all.nl/~wvganswk/esp.htm> troviĝas esperanto-kurso por nederlandlingvanoj. Krome la kursanoj povas aliĝi al listo speciale por ili kaj dum duona horo semajne estas ebleco retbabili kum mi kaj la aliaj. Nun mi ek kolektas fotojn de la partoprenantoj sur mia listo por ke ni iom pli bone ekkonu unu la aliajn.

Kore salutas vin, Wil.

Mesaĝo dissendita de la listo
E-INS = Esperanto-Instruado
Informoj ĉe: <http://lps.uniroma3.it/eins>.

MESAĜO DE LA KASISTO

Kotizoj de KELI por 2001 necesas korektojn:

Britio: 15 GBP

Cheĥio: 250 CZK

Antaŭdankon por via frua pago!

POR VIA FESTO

Jen saluto plej sincera
por vi, Jacques, kaj por vi, Vera!

Kvardek jaroj — kia riĉo!
En sufer' kaj en feliĉo
vi la vivon solidare
vivis kune, ĉiam pare.


Sed samtempe — kia ĝu'! —
kreskis la individu',
kreskis ŝi kaj kreskis li
kun la propra melodi'.

La ĉielo plu vin benu,
super vi la manojn tenu,
donu la necesan saĝon
kaj por agi la kuraĝon,
kun vizioj kaj kun fortoj
pli ol povas diri vortoj.

Ni gratulas vin duete.
Adolf kantas, flutas Grete.

Okaze de la 40-jara geedza jubileo
de Jacques kaj Vera TUINDER

tiel salutis
Adolf kaj Grete BURKHARDT



MESAĜO DE LA SEKRETARIINO

La landaj reprezentantoj kaj sekretarioj estas petataj sendi al la sekretariino mallongan jarraporton.

Ŝi ankaŭ ŝatas scii kiu partoprenos la Universalan Kongreson en Zagrebo.

Nekrologo

Amy NILSSON

La 7-an de januaro ĉi-jare Amy NILSSON forlasis la teran vivon. Du tagojn pli frue ŝi trinkis kafon kun kelkaj KELI-anoj. Ŝi naskiĝis en MalMBERGET en Laplando la 15-an de februaro 1915. Kiam ŝi translokiĝis al Stockholm, ŝi unue laboris en la kuirrejo de la Misia Lernejo. Poste ŝi studis iomete kaj iĝis asistanta flegistino.

Amy iĝis membro de KELI en 1950, kaj baldaŭ dumviva membro. Ŝi ege ŝatis vojaĝi sola kaj povis dum niaj kunvenoj rakonti pri Kanado, Aŭstralio, Egiptujo kaj Ĉinio. Samtempe ŝi montris bildojn. Multajn UEA-kaj KELI-kongresojn ŝi partoprenis. Kiam ŝi veturis al aliaj landoj, ŝi loĝis en migrulhejmoj kaj preparis mem la manĝaĵon.

Ŝi estis membro de Andreaskyrkan, (Sveda Misia Federacio), sed vizitis plurajn aliajn preĝejojn en Stockholm. Dum multaj jaroj ŝi kolektis monon por la organizo **Evidente**, pli frue **Agado E3**. Pro tio la Sveda sekcio de KELI sendis monon al Evidente kiel memoro de Amy.

Dum multaj jaroj ŝi suferis pro kancero kaj cerba hemoragio. Ŝi ne havis alian parencon ol nevon en Stockholm.

Arne LUNDKVIST

Vortserĉludo

U	K	O	S	A	M	O	T	V	B
J	J	O	H	A	N	O	P	A	R
O	A	F	I	B	U	V	R	N	E
E	K	U	C	O	H	T	S	I	L
R	O	V	A	H	O	R	T	E	P
D	B	I	M	L	P	E	C	T	A
N	O	N	O	R	G	D	U	N	U
A	S	M	A	T	E	O	G	E	L
S	E	L	G	F	I	L	I	P	O
O	N	O	M	I	S	A	J	A	Z

En tiu vortserĉludo estas kaŝitaj 10 nomoj de apostoloj. La nomoj troviĝas horizontale, vertikale aŭ ankaŭ diagonale en la diagramo. Ili povas parte koincidi aŭ esti skribitaj returne.

Fritz LAUTENBACH

Solvo de la vortserĉludo (825)

Horizontale: Predikanto, Amos, Eliro.
Vertikale: Genezo, Malaĥi, Jesaja,
Psalmaro.

Diagonale: Neĥemja, Levidoj, Ezra.

* * * * *

Korespondpeto

Li deziras korespondi pri muziko, arto.

Adreso: Jose Aparecido, C. Postal
79.314 Sao Joao de Meriti.

25501-970-Rio de Janeiro, Brazilo.

Kristanoj en Chengdu

Mia hejmurbo Chengdu, ĉefurbo de provinco Siĉuan, situas sudokcidente de Ĉinio kaj havas pli ol 4 milionojn da enloĝantoj. Laŭ antaŭkalkulo nun 1–2% de la urbanoj estas kristanaj kredantoj. Frue en la 30–40-aj jaroj tie ĉi estis pluraj predikistoj devenintaj de Britio kaj Francio, kaj ili disvastigis kristanisman al la publiko tre entuziasme. La vero de kristanismo logis multajn urbanojn, tiel ke la lastaj sincere fidis je Dio. Laŭ koncerna registro tiam en la urbo troviĝis 4 preĝejoj, kaj ĉirkaŭ pli ol 10 000 homoj ofte vizitadis ilin por aŭskulti la paroladon de la misiistoj.

Poste ĉar la ĉina registaro praktikis pordoferman politikon, ne eblis plu fari misiistan laboron, la kristanoj de la tuta lando devige silentis kaj la internacia socio ne povis scii la efektivan staton de la ĉinaj kristanoj. Ankaŭ la Chengdu-aj kristanoj ĉesigis sian aktivadon dum multaj jaroj.

Sed ekde la 90-aj jaroj, precipe en la lastaj jaroj lokaj kristanoj ege vigliĝis. La nove fondita misiejo pro sia efika laboro stimulas multajn gejunulojn, ke ili deziras partopreni en diversaj kristanaj agadoj. Tiuj agadoj kutime okazas unufoje ĉiusemajne. En la preĝejoj de mia urbo oni studas la Bibliion, legas la monatan revuon Vento el Dia Regno, eldonitan de la Ĉina Kristana Ligo, kaj diskutas inter si pri religiaj problemoj.

Plejparto de la urbanoj ne kontraŭas religiulojn kaj ĝenerale subtenas ke kristanoj disvolvas sian aktivadon, opi-

niante ke kristanismo kapablas trankviligi nian koron kaj helpi nin por altigo de nia animo. Ankaŭ mi mem partoprenis du-tri-foje en kristana kunveno.

En la kunvenoj, krom preĝado, estas ankaŭ interesa ludado, ekzemple kantado kaj ĝuo de muziko. Ĉiuj ĉeestantoj sentis, ke la amuziĝado estas en plena vigleco. Al kelkaj junaj kristanoj mi montris mian revuon Dia Regno en Esperanto, kaj por ke ili komprenu, mi tradukis ĝiajn tekstojn en la ĉinan lingvon. Ili tre ĝojas, ĉar ili neniam vidis kristanan legaĵon en alilando, kaj soifas kontakti kun eksterlandaj kristanoj por interŝanĝi konojn pri religio.

Vespere de Kristnasko 2000 en Chengdu almenaŭ kelkaj dekmiloj da lokaj kristanoj aktivis en pluraj preĝejoj por varme festi. Krome, ambaŭflanke de la stratoj firmaoj sin ornamis per bela Kristnaska arbo, sur kies verdaj branĉoj multaj kandeloj brulis, kaj sanktaj bildoj, kiuj pendis nur dum Kristnasko. Oni sentis sin kvazaŭ en iu eŭropa urbo, en periodo de Kristnasko. La festado daŭris ĝis profunda nokto. Sed granda malfeliĉo neatendite okazis, ke en la sekvanta mateno la ŝtata radio raportis tre teruran novaĵon: ĝuste en la nokto de Kristnasko en la urbo Luoyang, centra Ĉinio, iu komercdomo suferis pro incendio. Pro tio 309 homoj mortis. Por la familioj de la mortintoj ja estis granda tragedio eĉ en la festo. Ni lokaj kristanoj, tion aŭdinte, preĝas kun lipoj moviĝantaj senvoĉe.

MU Binghua